

LA JUNA VIVO

REDAKCIÓ KAJ
ADMĪSTRADO :
LIMMEN (N. H.)
NEDERLANDO

Ĝironumero
209354 Nederl.

JARABONO :
NEDERLANDO :
0.80 GULDENO

Jarkotizo T. J. O. inkl.
»La Juna Vivo» 1 gld.

F. MEYER

**MONATA ORGANO
POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ**

Ho, mia kor'.

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor'!
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!

Al la nova jaro.

La graveco de nia afero estas nia fera ŝildo, kaj laborado, konstanteco, pacienco, pacienco, konstanteco kaj laborado, konstanteco, laborado kaj pacienco estas la fortoj, per kiuj ni devas venki, se eĉ granda parto de la nun disŝutata semo ŝajnas perdata. Al diversaj personoj, al kiuj nia celo ŝajnas neatingebla, ni povas diri, ke nenio en la mondo estas neatingebla por kolekto da personoj, kiuj, konsciante la tutan gravecon de sia afero, decidis malgraŭ ĉiuj cirkonstancoj neniam ripozi, ĝis ili venos al la celo.

Dr. L. L. Zamenhof.

Ludeto.

Ĉiu ludanto havas antaŭ si saman gazeton (esperantlingvan). La gvidanto nomas vorton, ekz. nomon de lando aŭ urbo, kiu troviĝas en la gazeto. Ĉiuj samtempe ekserĉas kaj kiu unua trovas la vorton, gajnas.

El „Originala Verkaro” :

„Gazetartikoloj el „La Esperantisto” (1890).

N-ro 13. *Al kelkaj senkuraĝaj Esperantistoj.* Ne sen intereso por vi eble estos la jena letero de unu el niaj amikoj: „En la komenco mi vane penis trovi en nia urbo amikojn por nia afero; ĉie mi renkontis rifuzon kaj post kelkaj malfeliĉaj provoj mi jam perdis la kuraĝon kaj ĉesis labori, konsolante min per la opinio, ke la mondo ne estas ankoraŭ matura por nia afero kaj ni devas atendi pli bonan tempon.

Sed post kelka tempo mi faris ankoraŭ unu provon kaj ĝi prosperis al mi trovi unu amikon por nia afero. Kune kun tiu ĉi nova amiko mi nun iris al mia unua rifuzinto kaj ni komencis denove la parolon pri la lingvo Esperanto. Vidante nun, ke mi jam ne estas la sola malsaĝulo en nia urbo, la dirata persono denove tralegis la broŝuron, pripensis ĝin pli serioze kaj fariĝis baldaŭ ankaŭ varma amiko de nia afero”.

N-ro 38. La plej malforta flanko de nia afero estas tio, ke ĝis nun ni ne havas ankoraŭ eĉ unu riĉan homon, kiu povus subteni nian aferon materiale. La tuta nia afero ĝis nun kuŝas sur la ŝultroj de personoj, kiuj havas bonan volon, sed ligitajn manojn kaj neniujn rimedojn. Dume nia afero, por progresadi rapide, postulas grandajn rimedojn. Oni devus dissendi en la mondon grandan nombron da lernolibroj kaj agitantaj broŝuroj, oni devus donadi verkojn k.c. Estas sendube, ke se ni havus materialajn rimedojn, nia afero irus cent fojojn pli rapide. Tial mi petas niajn amikojn peni, kiom ili nur povas, altiri riĉulojn al nia afero. Ankaŭ homoj kun konataj nomoj aŭ okupantaj gravan situacion en la societo estas por nia afero tre gravaj; kvankam jam nun inter la amikoj de nia afero trovas sin kelkaj personoj tre altaj kaj influaj, sed, pro kaŭzoj ne kompreneblaj al ni, ili bedaŭrinde sin ĝenas ankoraŭ ne sole fari ion publike por nia afero, sed eĉ almeti malkaŝe sian nomon. La plej grandan utilon al nia afero alportos tiu, kiu inklinigos por ĝi iun riĉulon, kiu volus preni sur sin la tutan materialan flankon de nia afero.

N-ro 40. *Al s-ro R. - i* Estus tre bone, se vi donacus po unu aŭ po kelkaj lernolibroj de nia lingvo al la kluboj aŭ societoj, kiuj ekzistas en via urbo kaj se vi zorgus, ke la lernolibroj kuŝu sur la tabloj en la legejoj de tiuj ĉi kluboj. Tion ĉi saman estus bone fari ankaŭ kun la bibliotekoj.

(Pensu ankaŭ pri gazetoj, broŝuroj k.t.p. red L. J. V. !!)

- - Ĉio, kio semas disputon kaj malamon inter la homoj, restu ĉiam for de ni!

Por komencantoj kaj junaj infanoj.

La legendo pri la vidvino Eŭfrazia.

Jen la legendo pri la vidvino Eŭfrazia :

La potenca orient-romana imperiestro Justiniano volis konstrui templon en sia ĉefurbo Konstantinoplo. Tiu templo devis fariĝi tiel bela kaj granda, ke ĝi superos ĉiujn konstruaĵojn de lia tempo. Justiniano, kiu estis Kristano, volis dediĉi la belegan konstruaĵon al Dio, ĉar li opiniis, ke li neniel pli bone povus servi al Li. Bedaŭrinde, ke li ĉe tio tro multe pensis pri propra grandeco. Lia brusto altiĝis ĉe la penso, ke li, la riĉa, potenca monarĥo, povos elspezi grandegajn sumojn por la templo. Pro tio li mem deziris pagi ĉiujn kostojn. Neniu en la regno rajtis aldoni eĉ unu moneron. Nur de li estos la donado. Li sola havos la honoron pro ĝi, ke la malproksimaj posteuloj ankoraŭ parolos pri la belega templo de Justiniano, la donaco de la imperiestro al Dio.

Oni komencis konstrui. Kaj malrapide, sed en admirinda beleco, aperis la grandioza templo. La vandoj konsistis el nobla marmoro ; la kupolo estis arte ornamita kaj fine ankaŭ la ora tegmento brilis en la suno. Fine la konstruaĵo estis preskaŭ preta kaj la potenca imperiestro inaŭguros ĝin. Li brilis pro kontenteco pri si mem. Ĉir-

Karaj geamikoj !

Diversfoje oni demandis nin: „Ĉu „La Juna Vivo” povos en la estonto regule aperi??”

Ni ĉiam laboris sub treege malfacilaj cirkonstancoj. Ĉiujare ni devis kovri grandajn deficitojn, sed momente nia financa stato estas tia, ke ni tute ne plu povas aldoni monon al „La Juna Vivo”. Pli ol iam en ĉi tiu peniga tempo ni do kalkulas je la subteno de nia legantaro. Se vi vere volas gardi „La Juna Vivo”, laboru laŭpove! Varbu abonantojn aŭ subtenantojn! Aranĝu kursojn! Vizitu niajn kunvenojn! Ĉie kaj ĉie propagandu por nia afero! Tiam sendube „La Juna Vivo” povos regule eliri. La respondo do estas al vi ĉiuj.

(Red. „La Juna Vivo”).

kaŭ li staris la pastroj kaj la potenculoj en la regno. Sur la placo staris la popolamasoj. Ĉiuj atendis la solenan momenton, kiam oni laŭ signo de la imperiestro inaŭguros la memorigŝtonon. Justiniano ĉizigis sur la ŝtonon: „Ĉi tiun templon donacis al Dio la imperiestro Justiniano”. - Jen li mansignis. La kurteno, kiu pendis antaŭ la ŝtono, forŝoviĝis

Sed - kio estis tio? Sur la ŝtono ne staris tio, kion ĉiu atendis, sed anstataŭe jenaj vortoj: „Ĉi tiun templon donacis al Dio la vidvino Eŭfrazia”.

Granda teruro ekregis ĉiujn. La imperiestro furiozegis. Li ordonis, ke oni gvidu antaŭ lin la vidvinon Eŭfrazia.

Sed kiu ŝi estis kaj kie oni trovos ŝin? Neniu konis ŝin kaj dume la literoj brilis sur la marmora ŝtono. Jen subite simpla ĉeestanto memoris, ke en la kabano apud la rivero loĝas malriĉega virino, kiu nomiĝas Eŭfrazia. Sed - kiel tiu malsana, malforta malrica maljunulino povus ŝanĝi la imperiestran surskribon? Eĉ la venĝema imperiestro komprenis, ke tio ne eblas. Tamen li volis vidi la virinon kaj paroli kun ŝi.

Oni portis ŝin antaŭ lian tronon. Estis malforta, maljuna patrino, kiu apenaŭ povis stari.

„Kial vi ŝanĝis la nomon sur ĉi tiu ŝtono?” demandis Justiniano malafable.

„Sinjoro”, diris la maljuna Eŭfrazia, „neniam antaŭe mi vidis ĉi tiun ŝtonon”.

„Sed kion do vi scias pri la templo kaj ĝia konstruo? Kion vi faris por ĝi?” kriis la imperiestro senpacience.

„Nenion, sinjoro”. respondis Eŭfrazia mallaŭte. „Nur al la bovoj, kiuj alportis la ŝtonojn, mi de temp’ al tempo donis iom da pajlo el mia matraco. La kompatindaj bestoj ofte estis tiom lacaj, kiam ili preteriris mian pordon”.

Kaj kiam ŝi vidis, ke la vizaĝo de la imperiestro iom mildiĝis, ŝi rakontis per sia tremetanta voĉo, ke ŝi jam dum multaj jaroj estas malsana. Ŝia nura konsolo estas malgranda birdo sur ŝia fenestro-breto. Por tiu konsolo ŝi estis danka al la ĉielo, kaj por montri tion, ŝi deziris doni ion de sia malriĉeco. Tial ŝi ĉiutage donis iom da pajlo el sia lito al la bovoj. Estis la nuro, kion ŝi povis doni.

Kaj jen - la Plej Alta Amo akceptis ŝian humilan donacon, la

donacon de amo, kaj Li malakceptis la donacon de la imperiestro, kostintan multege da oro, la donacon de la fiero.

La imperiestro staris muta, ĉar tiam li komprenis, ke nur tiu ofero valoras, kiun donis pura kaj sindona koro.

Respondu al jenaj demandoj:

Kio estis Justiniano? Kie li loĝis? Kio estas Konstantinoplo? Kion Justiniano deziris konstrui? Ĉu Justiniano havis religion? Kial li volis konstrui la templon? Kia estis Justiniano? Kial li volis pagi la tutan templon? Ĉu la konstruaĵo fariĝis bela? El kio konsistis la vandoj kaj tegmento? Kiu inaŭguris la templon? Kio okazis dum la inaŭgurado? Kia estis la imperiestro? Kial li tiel koleris? Ĉu oni konis la vidvinon Eŭfrazia? Kia ŝi estis? Kie ŝi loĝis? Ĉu ŝi venis al la imperiestro? Ĉu ŝi ŝanĝis la nomon sur la ŝtono? Kion ŝi sciis pri la templo? De kie ŝi prenis la pajlon por la bovoj? Kial ŝi ne aĉetis pajlon? Kion ŝi rakontis al la imperiestro? Ĉu li restis kolera? Kial la eta donaco de la vidvino valoras pli ol la granda donaco de la imperiestro?

La du eĥoj.

Malgranda knabo loĝis sur montoflanko, apud granda lago. Ankaŭ la alia flanko de la lago sur estis monto kun arbaroj. La knabo neniam estis tie kaj ofte li pensis: „Kio estas sur la alia flanko, en la arbaroj?”

Iam li staris ĉe la lago kaj li laŭte diris ion al si mem. Subite ŝajnis al li, ke li aŭdis respondon. Li silentis kaj aŭskultis senspire. Li aŭdis nenion. „He!” li kriis. Tiam voĉo de la alia flanko respondis: „He!” Ĝi sonis tute kiel lia propra voĉo kaj li pensis: „Estas knabo sur la alia bordo”. Li tre scivolis, kia estas la knabo, kiel li aspektas. Baldaŭ denove li kriis: „He!” La voĉo respondis lin, sed ne diris alian vorton. Li ekkoleris, ĉar la voĉo precize imitis lin. Li kriis: „Vi estas malnobla knabo”. La voĉo respondis tuj en la sama tono: „malnobla knabo!” La knabo ĉiam pli kolorigis, kaj kriis: „Mi ne amas vin!” Tuj li aŭdis: „ne amas vin”,

Tiam la knabo forkuris al sia patrino kaj rakontis pri la malbona malĝentila knabo sur la alia bordo de la lago.

La patrino ridetis. Ŝi diris: „Iru denove al la bordo kaj parolu ĝentile. Eble tiam ankaŭ la voĉo respondos afable.

La knabo iris kaj kriis kiel antaŭe: „He!” Tuj venis la respondo: „He!” Li memoris la vortojn de la patrino kaj kriis: „Vi estas bona knabo!” Li aŭdis: „bona knabo”. Tio ĝojigis lin. Li pensis, ke lia patrino pravas. La alia knabo estas bona, se li nur afable parolas

al li. Post momento li ree provis: „Mi amas vin!” Denove afabla voĉo diris: „amas vin!”

Nun li komprenis, ke la alia knabo ĉiam respondis laŭ lia propra humoro. Se li mem parolas afablajn vortojn, li ricevas afablajn vortojn, sed kiam li diras malafablaĵojn, li aŭdas malafablajn vortojn.

Tiel estas kun ni ĉiuj. La alia homo estas eĥo de ni mem. Amo akiras amon, afableco akompanas afablecon. Kaj ĉiu faras sian mondon laŭ sia humoro.

(Japanio). Adapte laŭ rakonto en „Vortoj de Macua Sasaki”.

Plantidoj kreskas.

Kiam mi komencis labori en la vinberejo, la vinarboj estis kvazaŭ senvivaj kiel en la mezvintro. Apenaŭ estis mallongaj ĝermoj sur la nigre ruĝaj branĉoj. Tamen baldaŭ ili vive kaj freŝe kreskadis. Grandaj verdaj folioj sane prosperis sur la longaj sarmentoj kaj baldaŭ ili floris bonodore. Poste la malsupren pendantaj floroj jam estis fruktoj kaj nun ili fariĝis bluaj juveloj.

Tomato kreskis. En la laboro de plugisto mi povas pie kompreni la signifon de la vortoj en la verko de l'antikva Ĥinuĵo: „Ĉio en la universo iras kaj ŝanĝiĝas ja komplete sane”.

Estis komence de majo, kiam mi metis la semon en la bedon. Tagon post tago la plantidoj kreskadis tre rapide, kun gaja koncertoj de ranoj, kaj jam venis la tago por la plantado. Ja estas mirige, ke ĉiuj kulturaĵoj tiel rapide kreskas! Tia prospero kaŭzis ĉe mi miron pli grandan ol tiun, kiun mi spertis sur Ginza strato, kiam mi la unuan fojon veturis al Tokio.

(Japanio).

El „La Verda Stelo”.

Pri la instinkto de la bestoj.

Antaŭ nelonge mi pri tio legis trafan rakonton. En la jaro 1923-a okazis io tre stranga en la proksimeco de Tokio, la ĉefurbo de Japanio. Frumatene, kaj kelkfoje ankaŭ tagmeze la hundoj en la urbo kaj en la tuja proksimeco levis la kapojn kaj plor-bojis en tre stranga maniero. Kelkaj pli aĝaj farmistoj en la eksteraj kvartaloj de la urbo paliĝis pro ektimo, kiam ili aŭdis tion. Laŭ sperto ili sciis, ke tio signifas alproksimiĝantan danĝeron.

Kaj jen, la 1-an de novembro venis la katastrofo. Estis tertremo, pli terura ol iu povis memori. La tero tremis, tondris, skuiĝis kaj

large malfermiĝis. Milojn da homoj ĝi englutis, multaj mortis sub la ruinoj. - La scienculoj povas per siaj belegaj instrumentoj precize esplori, kie okazis la katastrofo . . . ili ne povas antaŭdiri ĝin. Sed la hundoj per sia plorado jam tagojn antaŭe anoncis ĝin.

Ĉu vi iam aŭdis, ke ratoj forlasas alfundiĝontan ŝipon? Jam tagojn antaŭ ol la ŝipo pereos la ratoj forlasas ĝin. Ŝajnas, ke la bestoj antaŭsentas, ke venos uragano kaj ke la ŝipo veturos sur rokon.

Ĉe la granda erupcio de Krakataŭo ĉiuj bestoj jam forlasis la danĝeran regionon antaŭ ol la homoj supozis tertremon aŭ erupcion.

Kaj ankoraŭ io: Kiel eblas, ke la abeloj ĉiam retrovas sian korbon? Per la bona flarsento? Ho, tute ne, ĉar se oni metas la korbon sur alian lokon, ili iras ne tien, sed al la loko, kie la korbo antaŭe staris. - Kaj rigardu la birdojn. Ili scias, kiun arbon la fulmo trafos. Ankoraŭ neniam okazis, ke la fulmo trafis arbon, sur kiu estas birdoj, dum la aliaj arboj estas plenplenaj.

Fanfaronajo.

Unua pentristo: Mi iam pentris belegan guldenon sur la strato. Ĝi estis tiom natura, ke viro preskaŭ forgratis sian ungon sur ĝi.

Dua pentristo: Tio estas nenio kompare kun la peco da viando, kiun mi pentris sur stono.

Unua pentristo: Kio do okazis al ĝi?

Dua pentristo: Venis hundo kaj tiu rimarkis sian eraron nur, post kiam ĝi formanĝis duonon de la ŝtono!

Ne multe.

Karlo estis por la unua fojo en la lernejo. Poste la patro demandas: „Kion vi hodiaŭ lernis, knabeto?”

Karlo: „Ho, ne multe. Almenaŭ - ni morgaŭ denove devos veni!”

La okulvitroj.

Iu kamparano ne povis legi. Iam li vidis, ke maljuna sinjoro surmetas okulvitrojn antaŭ ol li komencis legi. La kamparano pensis: „Mi aĉetos okulvitrojn. Tiam ankaŭ mi povos legi!”

Li veturis al la urbo kaj eniris butikon, kie oni vendis okulvitrojn. La kamparano surmetis paron kaj provis legi en libro. Sed li ne sukcesis. Li diris: „Tiuaj okulvitroj ne taŭgas”.

Tiam la vendisto donis aliajn. Ankoraŭ la kamparano ne povis legi.

„Sed - ĉu vi do kapablas legi?” demandis la komercisto.

„Se mi povus legi”, respondis la kamparano, „mi ja ne bezonus viajn okulvitrojn!”

Tempo estas mono.

Iun matenon, dum Franklin pretigis sian gazeton, maldiligentulo eniris la butikon. Dum unu horo li rigardis la librojn kaj fine prenis unu. „Kiom ĝi kostas?” li demandis al la butiko-knabo.

„Unu dolaron”, estis la respondo.

„Unu dolaron?” diris la viro. „Ĉu mi ne povas ricevi ĝin por malpli da mono?”

„Ne sinjoro, unu dolaro estas la prezo”.

Denove pasis horo. Tiam la viro diris: „Ĉu sinjoro Franklin estas hejme?”

„Jes sinjoro. Li estas en la presejo”.

„Mi deziras paroli kun li”.

La knabo iris al Franklin kaj diris, ke estas sinjoro, kiu deziras paroli kun li.

Franklin jam rimarkis la vizitanton kaj iris al la butiko.

La viro montris la libron kaj demandis: „Kio estas la plej malalta prezo por ĉi tiu libro?”

„Unu kaj kvarona dolaroj”, estas la respondo.

„Unu kaj kvarona dolaroj? Via servisto petis nur unu dolaron!”

„Jes vere. Kaj tiam mi pli bone povus liveri ĝin por unu dolaro ol nun lasi mian laboron en la presejo”.

La viro ne komprenis, kaj diris denove: „Nu, sinjoro Franklin, kio estas la plej malalta prezo?”

„Unu kaj duona dolaroj!”

„Unu kaj duona dolaroj??? Kaj ĵus vi diris unu kaj kvarona dolaroj!!!

„Jes”, diris Franklin, kaj tiam mi pli bone povis postuli unu kaj kvaronan ol nun unu kaj duonan, ĉar mia tempo estas mono!”

La viro pagis la libron kaj foriris kaj Franklin reiris al sia laboro.

Respondu al jenaj demandoj: Kion faris Franklin? Ĉu estos iu en la butiko? Kia estis la vizitanto? Kion li faris? Ĉu la knabo sciis la prezon de la libro? Ĉu la viro aĉetis ĝin? Kion la vizitanto fine deziris? Ĉu Franklin venis en la butikon? Ĉu li diris la veran prezon? Kion Franklin faris? Kial Franklin petis tiom da mono? Ĉu la vizitanto estis klera?

Stranga manĝaĵo.

La muelisto en „Gruntujo” estis ĉie konata kiel strangulo. Oni rakontis pri li multajn eksterordinarajn rakontojn. Pro tio la kamparanoj el najbara vilaĝo ne tre miris, kiam li iun malvarman vintrotagon envenis ilian drinkejon kaj mendis porcion da bifsteko kun terpomoj, ne por si mem, sed por sia ĉevalo.

La drinkej-estrino skuis sian kapon pro tiu mendo. La muelisto tamen diris: „Portu ĝin al mia ĉevalo; la besto volonte formanĝos ĝin!”

Kiam la manĝaĵo estis preta kaj laodoro de la rostita bifsteko alloge penetris en la nazojn de la gastoj, la estrino faris tiel, kiel oni ordonis al ŝi. La kamparanoj sekvis ŝin al la stalo, ĉar ili estis scivolaj, ĉu la ĉevalo manĝos tian ne-ordinaran nutraĵon.

Dume la muelisto sidiĝis apud la forno sur la benkon, sur kiu antaŭe sidis la kamparanoj. Post mallonga tempo revenis la mastrino kaj la kamparanoj, kaj la unua diris: „Via ĉevalo ŝatas nek bifstekon, nek terpomojn”.

„Tiam mi mem formanĝos ĝin” diris la muelisto kaj li bonapetite manĝis. Poste li ekstaris, surmetis sian surtuton kaj dankis al la kamparanoj, ĉar ili cedis al li sian lokon ĉe la varma fajro. Nur tiam tiuj komprenis, ke la muelisto mistifikis ilin. Tral LIANO.

Respondu al jenaj demandoj:

Kia estis la muelisto el „Gruntujo”? Ĉu la homoj sciis tion? Ĉu oni parolis pri li? Kion oni rakontis? Kien la muelisto iam venis? Ĉu estis homoj en la drinkejo? Kion la muelisto mendis? Ĉu oni tre miris pri tio? Ĉu la estrino de la drinkejo ŝatis la mendon? Ĉu ŝi plenumis la ordonon? Ĉu la bifsteko bonodoris? Ĉu la mastrino iris sola al la ĉevalo? Ĉu ankaŭ la muelisto kuniris? Kion li faris? Ĉu la forno estis varma? Ĉu la ĉevalo ŝatis terpomojn kun bifsteko? Kion faris la muelisto? Ĉu la kamparanoj tuj komprenis, ke la muelisto mistifikis ilin? Kiam ili komprenis tion?

- Tasko:**
1. Laŭtlege ĉiujn rakontojn en la rubriko por komencantoj.
 2. Notu ĉiujn vortojn, kiujn vi ne konas, kaj poste lernu ilin.
 3. Kopiu kelkajn rakontojn por alkutimiĝi al la Esperanto-stilo.
 4. Lernu parkere: „Plantidoj kreskas”, „Fanfaronajo”, „Ne multe”.
 5. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de: „La origino de la tabako”. „La du eĥoj”, „Pri la instinkto de la bestoj”, „La okulvitroj”.

Tiu estas forta, kiu neŝanceliĝante povas porti la plej pezajn ŝarĝojn, tion ni pripensu ĉiam kaj precipe en nia brua tempo.

Tre simplaj ekzercoj por tiuj, kiuj nur mallonge studis.

En la klaso.

(I).

En la klaso estas benkoj, tablo, seĝo, tabulo kaj ŝranko. Sur la muroj estas bildoj. En la benkoj estas lernantoj. Lernanto estas persono. Seĝo kaj tablo estas mebloj. Papero, kreto, kraĵono, lampo, bildo kaj libro estas objektoj. Tio estas fenestro kaj tio estas pordo. Mi estas instruisto kaj vi estas lernanto. Ĉu vi estas lernanto? Jes, mi estas lernanto. Ĉu vi estas instruisto? Ne, mi ne estas instruisto, sed mi estas lernanto. Kio estas kraĵono? Kraĵono estas objekto. Ĉu vi estas objekto? Ne, mi ne estas objekto, sed mi estas persono.

Kio estas en la klaso? Kio estas sur la muroj? Kie estas la lernantoj? Kio estas lernanto? Kio estas seĝo kaj tablo? Kio estas papero, kreto, libro? Kiu estas mi? Kiu estas vi? Kio estas mi kaj kio estas vi? Kio estas sur la tablo? Kie estas la bildoj? Ĉu en la klaso estas pordo kaj fenestroj? Kiu estas instruisto? Kiuj estas en la klaso? Kiuj mebloj estas en la klaso? Kiuj objektoj estas sur la tablo?

(II).

Li estas lernanto kaj ŝi estas lernantino. Instruisto estas sinjoro. Instruistino estas fraŭlino. Lernanto estas knabo kaj lernantino estas knabino. La kreto estas blanka. La tabulo estas nigra. La papero estas ruĝa. La libro estas flava. La kraĵono estas verda. La pordo bruna. Kia estas la ruĝa papero? La ruĝa papero estas granda. La flava papero estas longa. La bruna pordo estas alta. Nia klaso estas granda kaj bela. Kie estas via kraĵono? Mia kraĵono estas en la libro. Iliaj libroj estas sur la benkoj. La spongo estas sur la tablo.

Ĉu nia lernejo estas granda? Kia estas nia klaso? Kiaj estas la benkoj? Kia estas la tabulo? Kio estas ŝi? Kio estas instruisto? Kio estas lernanto? Kio estas lernantino? Kio estas blanka? Kio estas nigra en la klaso? Kia estas la pordo? Kia estas la ruĝa papero? Ĉu la flava papero estas granda? Kia estas la bruna pordo? Kie estas iliaj libroj? Kiaj benkoj estas en nia klaso? Kiu estas alta kaj kiuj estas malaltaj? Kia homo estas nia instruisto? Ĉu vi estas instruisto? Kiaj estas viaj lernejoj?


Ĉu vi jam varbis novan membron aŭ simpatianton ĉijare???

(III).

Esperanto estas bela kaj tre facila lingvo. Skribi kaj legi Esperante estas facile. Ni lernas volonte Esperanton en la lernejo. La instruisto staras apud la tabulo kaj skribas novajn vortojn per la kreto. Ni legas ilin kaj ankaŭ skribas ilin en nia kajero. Ni skribas ne per krajono, sed per plumo. La instruisto iras de la tabulo al la pordo kaj demandas al ni: „Kion ni faras?” Ni respondas forte kaj kuraĝe: „Vi iras de la tabulo al la pordo”. La koloro de la tabulo estas nigra kaj la koloro de la papero estas blanka. La instruisto montras al ni grandan koverton. Ni ne scias, kio estas en la koverto, sed la instruisto bone scias. Li malfermas la koverton, en kiu estas bela bildo. Ĝi prezentas sinjorinon kaj knabinon. Lernantoj, montru al mi viajn kajerojn!

Kio estas Esperanto? Kia lingvo ĝi estas? Kie vi lernas Esperanton? Ĉu vi lernas ĝin volonte? Apud kio staras mi? Apud kiu lernanto vi sidas? Ĉu mi staras apud la tablo? Kion mi faras? Ĉu mi skribas per plumo? Kion mi skribas per la kreto? Kion vi faras? Ĉu vi skribas novajn vortojn? Per kio vi skribas en via kajero? Ĉu vi respondas al mi kuraĝe kaj elegante? Ĉu miaj demandoj estas facilaj? Kia estas la koloro de la pordo? Ĉu la koloro de la tabulo estas bruna? Kion mi montras al vi? Ĉu ĝi estas malgranda koverto? Ĉu vi scias, kio estas en la granda koverto? Ĉu la bildo estas bela? Kion prezentas la bildo? Ĉu mi montras al vi malgrandan bildon? Kie pendas la bildo? Al kiu vi respondas kuraĝe? Kie estas multaj benkoj? Kion vi lernas? Ĉu mi malfermas la pordon? Kion mi fermas? Ĉu estas vortoj sur la tabulo? Kion formas la vortoj? Ĉu la frazo estas longa? Ĉu vi scias, kio estas en mia skatolo? Kia estas la koloro de mia skatolo? Ĉu la skatoloj estas egalaj? Ĉu estas facile legi kaj skribi Esperante?

PROF. SYGNARSKY, Bydgoszcz (Pol.).



Tutmonda Junular-Organizo.

Adresoj:

Sekretario: S-ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.

Kasisto: S-ro M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam (Ĝiro 330139).

Filmservo: S-ro H. Schut, Koedijk (N.H., Ned.) Ĝiro 310334.

„ : S-ro John Holland, 61 Vandyke Rd., Leighton-Buzzard (Beds, Angl.).

Red. „La Peranto” kaj „De Esperantist”: Meent 35, Leerdam, Ned.

(Ĝiro 386072).

Kio nun?

La ŝtormo, kiu furiozas super Eŭropo, tuŝis ankaŭ Nederlandon kaj alportis post teruraj tagoj grandajn ŝanĝojn.

Rekonsciinte post la forpaso de la militbruego, ni vole ne vole demandas al ni: kio nun?

Ni konscias, ke ni staras je la komenco de nova epoko, kiu multflanke diferencos de la estinto kaj kies aspekton ni ankoraŭ ne povas supozi. Sed sentime ni rajtas atendi ĝin, ĉar movado kiel nia, kies bazo estas konstruita sur la nedetruibla fundamento de Amo kaj Vero, povas labori kaj vivi sub ĉiu reĝimo kaj en ĉiu medio.

Feliĉe ni povis konstati, ke niaj membroj plene komprenis tion, ĉar ekde la unua tago post la milito ili ree eklaboris kiel antaŭe; ili ne ĉesigis siajn klubkunvenojn kaj kursojn; ili ne finis propagandi por nia organizo; la fakto, ke ni en la daŭro de kelkaj semajnoj povis enskribi pli ol 20 novajn anojn, povas pruvi tion. Kaj ili ne haltigis la aranĝadon de la diversaj projektitaj semajnfinaj kunvenoj, el kiuj la unua jam plensukcese okazis.

Kompreneble ni ne rajtas tute malatenti la novajn cirkonstancojn, en kiujn la sorto nin gvidis. Ni devas kalkuli, ke provizore la internaciaj rilatoj restos malfacilaj, dum kio nia unua zorgo estu, konservi tion, kion ni konstruis dum du jaroj en multaj landoj.

Pro la nova situacio niaj perantoj ekster Nederlando en la proksima estonto devos agadi ankoraŭ pli memstare ol antaŭe, dum la estraro ĉefe devos labori en limigita regiono.

Estas pro tiu kaŭzo, kaj pro multaj aliaj malfacilaĵoj, ke ni devis decidi ne okazigi la trian Internacian Junular-Kunvenon 1940. Anstataŭ ĝi, ni aranĝos por la nederlandaj membroj plurajn malpli grandajn kunvenojn.

Sed kiel ajn - ĉu nia laborkampo estos vasta aŭ limigita - ni ne ĉesos labori plenenergie kaj seninterrompe por la bona afero. Se la tempo, en kiu ni vivas, estas malhela — ĝi kondukos nin pli proksimen al la Efektiviĝo de nia Idealo, ol longa vico de kvietaj jaroj povus fari . . .

La unua T. J. O.-semajnfino 1940 okazis la 23-an kaj 24-an de junio en la kooperativa konstruaĵo „De Eenheid”, Bakkum, Nordholando. Malgraŭ la fakto, ke ni pro la konataj cirkonstancoj ne vaste povis propagandi ĉi tiun kunvenon, ĝi fariĝis brila sukceso! Favorate de belega vetero 130 junaj esperantistoj ĝuis neforgesiblajn tagojn en la bela naturo de tiu dunregiono. La ĉarmaj promenadoj tra la dunoj, banado en la Norda Maro (dum kio eĉ ne mankis la ĉiama reveno de la Lumo post malhelaj momentoj...), la ludoj en la arbaro kaj kantado en la feria domo, ĉi ĉio kaŭzis, ke la semajnfino fariĝis unu el la plej bonaj T. J. O.-kunvenoj; kiujn ni iam havis.

Trafis nin, ke la partoprenantoj de ĉi tiu kunveno grandparte konsistis el „nova T. J. O.-generacio”; anoj de niaj nordholandaj infankursoj. La fruktoj de la pasinta vintro . . .

Pro la granda sukceso de ĉi tiu kunveno ni decidis ripeti ĝin kaj do aranĝi

Novan T. J. O.-semajnfino en la sama loko, je la 24-a kaj 25-a de aŭgusto. Tiujn, kiuj ĉeestis la pasintan semajnfino, ni ne bezonas instigi partopreni en ĝi, ĉar la memoro faros tion anstataŭ ni. Sed al tiuj, kiuj ne vizitis ĝin, ni vokas: venu! ĉar la nova kunveno estos ankoraŭ pli bela kaj impona! La prezo: ĝi ne povas malhelpi vian venon, ĉar ĝi estos nur 65 cendoj, (trinkaĵoj, bongustaĵoj kaj tranoktado enkalkulitaj). Personoj, pli aĝaj ol 21-jaraj, pagos 75 cendojn.

(Verŝajne ni aranĝos du kunvenojn en „De Eenheid” je la 24-a kaj la 25-a de aŭgusto, por T. J. O.-anoj, pli aĝaj ol 17-jaraj je la 7-a kaj 8-a de sept. por junaj T. J. O. anoj. En la lasta kunveno partoprenos la tuta T. J. O. estraro, por ke ni povu aranĝi nian oficialan jarkunvenon. Anoncu vin por Bakkum kiom eble plej baldaŭ kaj samtempe sendu vian aliĝmonon al f-ino Kool, West Grafdijk, ĝiro 382363).

T. J. O.-kunveno en Leeuwarden (Frislando). — Pro la nunaj cirkonstancoj ni decidis organizi la T. J. O.-kunvenon ĉefe por niaj membroj kaj amikoj en la provinco Frislando, sed ankaŭ ĉiuj el la ceteraj provincoj estos bonvenaj.

Dimanĉon, la 14-an de julio, ni faros biciklo-ekskurson al Beetsterzwaag; foriro je la 8.30-a horo ĉe la hotelo „De Bleek” (Groninger straatweg, Leeuwarden). Ĉiuj partoprenontoj kunportu buterpanojn k.t.p. Ni fiksas la kotizon je 50 cendoj (enir-bileto por la arbaro, bongustaĵo kaj trinkaĵo).

Tiuj, kiuj estos en Leeuwarden jam sabatposttagmeze, kunvenos por interkonatiĝi sabatvespere (do la 13-an de julio) je la 7.30-a horo en la parko „Prinsentuin”. Eniro senpaga.

Ni zorgos por senpaga tranoktado ĉe gesamideanoj por tiuj, kiuj venas de malproksime kaj pro tio devos pasigi la nokton en Leeuwarden.

Ni notas aliĝojn nur post ricevo de la kotizo (50 cendoj), kiun oni pagu per 5-cendaj poŝtmarkoj al f-ino E. van Wetering, T.J.O.-perantino, Schalkburgerstraat 10, Leeuwarden. Se necese, oni samtempe klare informu la perantinon pri la tempo de sia alveno en Leeuwarden kaj ĉu oni deziras, ke ni zorgu por la senpaga tranoktado.

Anoncu vin kiel eble plej baldaŭ, sed plejlaste antaŭ la 5-a de julio 1940-a.

Se la vetero estos bela, tiam el Nordholando foriros biciklo karavano al Frislando. Petu informojn de Jenneke van Veenendaal, Limmen (N.H.)

La Peranto inter la Perantoj. La 6-a numero de „La Peranto” duone estis preta, kiam la milito trafis Nederlandon. Pro la rapideco, per kiu la okazaĵoj fariĝis, la enhavo jam ne plu estas aktuala kaj ni decidis ne finpretigi ĝin, sed prokrasti la eldonon kelkajn semajnojn.

Kaskontrolo. Ni ricevis jenajn deklarojn pri kaskontroloj:

Ni deklaras, ke ni kontrolis la kaslibrojn de T. J. O. kaj trovis ĉion en bona ordo.

Rotterdam, 27-3-'40.

(e.s.) M. Seilberger.

R. van Vlaardingen.

Subskribintoj komunikas, ke ili kontrolis la kason „De Esperantist”, kaj trovis ĝin en bonordo.

(e.s.) J. van Wijgerden.

Leerdam, 13-3-40,

M. Snijders.

Oficiala Jarkunveno. La ĉiujara membrokunveno de T. J. O. okazos la 24-an de aŭgusto en la konstruaĵo „De Eenheid”, Bakum (N.H.), posttagmeze je la 4-a horo, do antaŭ la komenciĝo de la semajnfino en la sama konstruaĵo. Tagordo de la membrokunveno estos havebla en la salono. Ĉi tiu komunikado servos kiel nura kunvokilo; ni fidus pri la veno de ĉiuj fidelaj T. J. O.-anoj. Grupoj, kiuj iukaŭze ne povos veni entute, sendu reprezentanto(j)n! Proponojn oni sendu antaŭ la 10-a de aŭgusto al la sekretario.

Nova T. J. O.-propagandilo. Ĝuste antaŭ la momento, kiam la milito okupis ankaŭ Nederlandon, ni farigis kvanton da belaj T. J. O.-bicikloflagetoj. Pro la subitaj okazaĵoj ni ne povis komuniki tiun novan eldonon. Tiom pli agrable trafis nin, ke malgraŭ tio la flageto jam trovis sian vojon kaj estas uzata de multaj T. J. O.-anoj, ĉar ĝi per sia belaspekto reklamis por si mem. Sed - ankoraŭ ne ĉiuj ned. membroj portas ĝin! Tiuj, kiuj ankoraŭ ne posedas ĝin, mendu ĝin baldaŭ ĉe unu el la konataj adresoj: la prezo estas 30 cendoj, afranko enkalkulita.

Fl. M.

Neniam estas tro da floroj en la mondo kaj neniu afabla vorto estas superflua.

„De Esperantist” en la nuna tempo.

Historie la epoko, en kiu ni vivas, estas tre grava. Hodiaŭ estas verkata parto de la mondhistorio, kiu influos la iradon de la homaro ĝis en la malproksimega estonto.

Ne estas facile vivi en tia epoko. La homoj staras en la turniĝo, unuj pro perdoj, aliaj pro timo por perdoj, ne plu povas resti si mem, kaj estas kunportataj kun la fluego, ĝis . . .

Tio ne estas tolerebla. En ĉi malfacila tempo plendoj kaj ploroj pri la estinto estas vanaj, ĉar ĝi neniam revenos.

Ni, Esperantistoj, scias, ke al ni estas la estonto. Iam la homoj interkompreniĝos, iam la bela sonĝo pri daŭra paco efektiviĝos kaj plej certe el la nuna ĥaoso ĝi naskiĝos.

Ni nun restu ni mem. Ni konservu kaj plifortigu la spiritan trezoron, kiun Zamenhof donis al ni kaj kiu estas la ilo por solvi la nunajn problemojn.

Ni ne ĝis blindiĝo rigardadu la estonton. Ĝi estas fiksita laŭ la neŝanĝebla leĝo de la mondon reganta Eterna Forto. Ni atentu nur la estanton kaj restu sur niaj postenoj, por ke ni estu pretaj por krei el ĝi la estonton, nian estonton!

Ni provizore zorgu, ke restu kontakto inter ni. Kaj kiel kontakto estas pli efika ol per organo?

T. J. O. havas diversajn organojn kaj la estraro streĉos ĉiujn fortojn por kiel eble plej regule aperigi ilin.

Inter tiuj organoj nia holandlingva propagandgazeto „De Esperantist” okupas apartan lokon. Ĝi estas unikajo, sed montriĝis, ke ĝi ne estas luksajo, ĉar ĝi efike helpis nin propagandi nian idealon inter la nederlandlingvanoj. Kaj ĝi ankau nun helpos nin. Ĝi povas regule aperi, kiam ni estas certaj pri helpo de vi ĉiuj.

Tial ni konstruu ian firman bazon, je kiu ni povos daŭrigi la eldonon. Faciligu al ni la laboron, karaj gesamideanoj!

Se ankoraŭ vi ŝuldas ion al „D.E.” baldaŭ pagu. Se ankoraŭ ne vi kunlaboris, sendu al la redakcio la certigon de estonta kunlaboro. La adreso estas: Red. „De Esperantist”, J. Kars, Meent 35, Leerdam, ĝironumero 386072. (Atentu la novan ĝirnumeron!)

Kaj kun via helpo ni daŭrigos nian laboron por nia paca idealo. J. K.

De la Redakcio.

(Pro diversaj kialoj ni ne povus enpresigi la rubrikojn „Korespondado”, „Enigmoj”, „La Juna Vivo en La Juna Vivo” kaj „Korespondadadreso”. Se eble ili denove aperos en la aŭg. numero.

Tiuj, kiuj ne esperas, jam perdiĝis.

Tiuj, kiuj ne batalas, ne venkos.

La 10-an de majo mortis sur la bataalkampo nia T.J.O.-ano

DIRK SOEK.

Li estis 35-jara kaj postlasis edzinon kaj unujaran filineton. La enterigo okazis en Hilversum la 31-an de majo. Li estis tre afabla kaj modesta persono kaj ni perdis tre bonan amikon. Li estis jam dum jaroj esperantisto, kiu bone sentis la idealon. Ĉiam kuraĝa kaj fidela. Li antipatiegis la militon. Li restos en nia memoro.

La estraro de T. J. O.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

„Wat ieder Christen van Esperanto weten moet”. Belaspekta, 13-paĝa nederlandlingva propagandbroŝuro. Eld. „Nederlandse Christelijke Esperanto-Vereniging, afd. Eindhoven”. Prezo: 6 c. Adr. por mendoj: A. de Smit, Bredalaan 132, Eindhoven, ĝironumero 209929.

NEDERLANDA ESPERANTISTO. Kongresa numero, okaze de la XII-a Kongreso (23 - 24 - 25 marto) en Arnhemo. Tre belaspekta libreto kun belegaj fotoj pri Arnhemo kaj ĉirkaŭaĵo.

SYNNOVE SOLBAKKEN, verkis Björnstjerne Björnson, el la norvega lingvo tradukis E. kaj A. Weide. Eldonis E. kaj A. Weide en Aarhus, Danujo. Prezo 1.50 d.kr.

TUTMONDA MOVADO eldonis la unuan cirkuleron holandlingve kaj la duan cirkuleron Esperante.

Ambaŭ cirkuleroj estas senpage akireblaj. Petu informojn al s-ino v. Veenendaal, Limmen (N.H.).

Anoncetoj (30 c. por ĉiu linio).

PRIN-TEMPO - KANTO-TEMPO. Meze en la juna verdaĵo oni pensas nur pri la „La Juna Vivo” kaj ne povas ne kanti el „La Juna Vivo”-kantaro.

Prezo nur 35 c., du ekz. por 50 c. plus afranko.

VIVO DE ZAMENHOF - Edm. Privat. Ĉiu Esperantisto nepre legu ĉi verkon pri la vivo de nia majstro. Prezo (bind) guld. 1.75. Oni instigu la ne-Esperantistojn legi la nederlandan eldonon. Prezo (broŝ) guld. 1.25. Mendeblaj al „La Juna Vivo”, Limmen (N.H.), nederlando.

MALKARAN LEGAĴON por ĉiuj Esperantistoj oni trovas en la binditaj jarkolektoj „La Juna Vivo” (1-a, 2-a, 3-a jaroj). Belaspektaj, pr. 200 p. libroj. Prezo nur po 35 c. plus afranko. Mendu nun, eble la prezoj plialtiĝos!!